**PILO-PRESS**

Interncia Informservo

N-ro 7/1973 12 feb 73

Aperas ĉiusemajne



Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69


"FREIE WELT" dec. 1972 publikigis ampleksan intervjuon pri Esperanto kun Detlev Blanke, Sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en Germana Demokratia Respubliko

„ESPERANTO? Zu trinken ist es jedenfalls nichts..."



"Esperanto? Trinki oni ĝin certe ne povas..."



„ESPERANTO? Nie was von gehört."

"Esperanto? Neniam mi ion aŭdis pri ĝi."

„ESPERANTO? Ganz schön, aber da gibt es viele Vorbehalte – soviel ich weiß."



"Esperanto? Bele, Bele, sed estas multaj rezervoj - kiel mi scias."

En la kvarpaĝa artikolo en la GDR-revuo oni publikigas la fotojn kaj opiniojn pri Esperanto de ses homoj el GDR. Pilo-Press ĉi-loke reproduktas la homojn kaj opiniojn.- Cetere la artikolo estas informriĉa, objektiva kun bonaj argumentoj. Estus dezirinde ke ankaŭ aliaj revuoj imitus tiun bonegan ekzemplon!



„ESPERANTO? Vielleicht wieder eine neue Margarinesorte..."

"Esperanto? Eble nova speco de margarino.."



„ESPERANTO? Eine ganz feine Sache – diese internationale Sprache."

"Esperanto? Bonega afero ĉi tiu internacia lingvo"

„ESPERANTO? Dafür habe ich mich schon vor über 30 Jahren interessiert."



"Esperanto? Por ĝi mi interesiĝis jam antaŭ pli ol 30 jaroj.

## Oficiala Esperanto-Kurso en San Diego

San Diego (US) La grava filialo de la Universitato de Kalifornio en San Diego, kun kampuso en la bela ban- kaj artisturbeto La Jolla ("la juvelo" en malnovhispana lingvo), ĉe la bordo de Pacifiko, enkondukis oficialan kurson, Lingvo/ Esperanto 16. Enkonduko al Esperanto. La kataloga priskribo de la kurso diras:

"Enkonduko al la strukturo de Esperanto, ĝia deveno kaj literaturo, kaj ĝeneralaj problemoj de planlingvaj projektoj. La studentoj atendeble scipovos paroli, skribi, legi kaj kompreni Esperanton je la fino de la kvaronjara semestro."

La kurson ofertas la Lingva Centro de la universitato, kaj inkluzivas instruadon en la lingva laboratorio. La Internacia Lingvo estas unu el nur ses lingvoj aktive instruataj ĉe la universitato en San Diego, kvankam ankoraŭ 34 aliaj lingvoj povas esti studataj per memstudo.

Richard E. Wood

## Prelego antaŭ pastoroj

Nürtingen (A.Bk.) Pastoro Burkhardt prelegis en Nürtingen antaŭ 65 pastoroj kaj aliaj eklezeiaj kunlaborantoj kun ties edzinoj en januaro pri Japanujo lige kun la Universala Kongreso 1965; li montris propraјn diapozitivojn kaj forte substrekis la rolon de Esperanto dum tiu vojaĝo. Unu el la aŭskultantoj, lerneja inspektoro, estis tiel ravita, ke li tuj aranĝis ripeton de la prelego por alia samspeca distrikto, en majo venonta.

## La lerneja instruado de la Internacia Lingvo

Nürnberg (PP) Kiel represo el Internacia Pedagogia Revuo aperis nun la kompleta teksto de la verkaĵo de prof. d-ro István Szerdahelyi, "La lerneja instruado de la Internacia Lingvo" en unu broŝuro.

Formato DIN A 5, 30 paĝoj, broŝ., prezo 3,- GM + afranko

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

## La Semajno en la Radio

Varsovio disaŭdigis siajn kutimajn programojn, radian ĵurnalon, komentariojn kaj felietonojn. Radio Libera Eŭropo kaj Radio Liberty ĉi-foje estis denove en la ataklinio de la politikaj komentarioj. Informoj kaj komentarioj pri Vjetnamio ne mankis, la paco estas malfacile kaj komplike realigebla. En la leterkesto oni prezentis "problemecajn leterojn" de la aŭskultantoj Bertil Englund kaj Anton Kronshage. Tiajn leterojn oni pli multe ŝatas ol nurajn laŭdajn eldirojn. La ĉi-foja Esperanto-Ekspreso havis apartan karakteron kun felietonoj, intervjuoj. Mankis la kutimaj rubrikoj.- Berno prelegis pri Ernest Naville, svisa filozofo, kaj unua honora prezidanto de SEF.- Pekino parolis pri agrikultura temo, pri Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso kaj prezentis popolan komunumon en antaŭurbo de Pekino.

************

Ĉu ekzistas Esperanta karnavalo? En 1965 LA GAJA FUNELISTO provis karnavalumi. Ekzemplero estas aldonita!